



# La Kolombo de Paco

6-a de aŭgusto 2021, numero 17

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova



## Ĉu vi scias? Via spaco en UEA.org

Ne ĉiuj homoj scias, ke oni povas agordi kelkajn gravajn detalojn pri si en persona spaco ĉe la retejo UEA.org. La persona spaco facile alireblas per <https://uea.org/via>. Oni devas ensaluti (kio eblas nur por aktualaj individuaj membroj). La unua agordeblo estas por retlistoj kaj retaj sciigoj el UEA. Ĉiuj bonvenas elekti la deziratajn sciigojn. Ni forte rekomendas, ke aktualaj membroj aliru tiujn spacojn por ricevi almenaŭ la sciigojn pri novaj numeroj de la revuoj Esperanto kaj Kontakto. Abonantoj, kiuj tion faras, ricevas personan ligilon por tuj elŭti la numerojn. Aliru <https://uea.org/via/retlistoj>, hoku la opciojn kaj alklaku la butonon "Abonu". Krom tio, vi ankaŭ povas en tiu spaco i.a. rememori pri via UEA-kodo, alŭti vian foton kaj kontroli libroservajn mendojn.

### Retlisto

- Gazetaraj Komunikoj de UEA (?)**  
Kvanto da abonantoj: 1209 abonita
- Laste aperis (?)**  
Kvanto da abonantoj: 589 abonita
- Anonco pri nova RE (?)**  
abonita
- Aŭtomata averto pri apero de novaj sonversioj de RE (?)**  
Kvanto da abonantoj: 18 abonita
- Anonco pri nova Kontakto (?)**  
abonita



Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio [redakcio@revuoesperanto.org](mailto:redakcio@revuoesperanto.org)



## Esperantic Studies Foundation (ESF)

■ Humphrey Tonkin, prezidanto  
Chuck Mays, ĉefdirektoro

Dum la Virtuala Kongreso de Esperanto ESF ĝojis havi okazon informi pri la aktivado de nia Fondaĵo kaj la kolegoj kiuj prizorgas ĝin. Se vi ne povis ĉeesti, ni invitas vin spekti la sesion por informiĝi pri la aktualajoj de ESF je <https://vk.retevent.com/programo?s=ESF> – respektbla ĝis la 19-a de septembro. Post tio ĉe [Youtube.com/UEAviva](https://www.youtube.com/UEAviva).



Se vi ne jam ricevas ĝin, ni rekomendas, ke vi enskribiĝu (senpage) por ricevi la *Informilon por Interlingvistoj* (IpI), kiu aperas (elektronike) kvarfoje jare kaj kiu enhavas aktualajn informojn pri aranĝoj, eldonaĵoj k.s. kiuj rilatas al Esperanto kaj interlingvistiko. Vi povas enskribiĝi per retmesaĝon al [IPi@esperantic.org](mailto:IPi@esperantic.org).

Se vi estas aktiva fakulo pri interlingvistiko kaj rilataj temoj, memoru, ke ESF donas subvenciojn kaj stipendiojn por subteni signifan studadon kaj publikigadon pri interlingvistiko. Vi trovos detalojn ĉi tie: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-subvencioj/>

Tiuj subvencioj, stipendioj kaj aliaj monhelpoj ĉefe rezultas el la frukto de la kapitalo de ESF. Ju pli da kapitalo ni havas, des pli da subteno ni povas doni al la studkampoj interlingvistiko kaj esperantologio. Se do vi estas en pozicio subteni nian agadon per via financa kontribuo, vi povas informiĝi tie ĉi: <https://www.esperantic.org/eo/donacoj/>.

**Koran dankon pro via kunlaboro!**





## Opinio pri la IKU-programo de la VK

■ Silvio Curtis

Kiel preskaŭ de-naska sciencemulo, mi ĝuegis la IKU en ambaŭ Virtualaj Kongresoj de Esperanto. Ĉi-foje mi havas eĉ la kroman feliĉon gajni senpagan libron, kiun Amri Wandel proponis kiel premion de sia kurseto pri nigraj truoj kaj gravitaj ondoj. La strukturo de konferenca prelego efikas esti bone transmetebla al virtuala formato, kaj mi trovis la lernan sperton glata. Mi ĉiam celis profiti la ŝancon fari demandojn ĉe la fino, kaj forte rekomendas agi tiel.



Mi rimarkas, ke astronomio preskaŭ konstante ĉeestas en IKU-programoj, kaj tio ja plaĉas, ĉar la kosmo estas inter miaj plej fruaj sciencaj intereso, kaj neniam forgesita. Ankaŭ rimarkas mi multon pri tiuj homsciencaj temoj, kiuj plej rilatas al internacia komunikado kaj justeco – kiel oni atendas inter esperantistoj! Eble estus bone, se aperus pli da prelegoj ankaŭ pri aliaj aferoj, kiel ekzemple pri aliaj flankoj de sociologio aŭ pri biologio, kiuj sendube ankaŭ interesas esperantistojn kaj estas efektiva kaj komprenendaj partoj de nia mondo.

Estis kontentige aŭdi en la Scienca Forumo, ke la prelegoj havis tiom da spektantoj. Do en Esperantujo intereso pri scienco ne mankas. Mi esperas ke tiu intereso daŭros ankaŭ ekster la kongresa mondeto, por ke ni havu ne nur prelegojn, sed ankaŭ pli da skriba enhavo bone verkita – kaj kio eĉ pli gravas, bone legata! – pri scienco en nia lingvo.



## VEKI jam baldaŭ! Aliĝu!

La 54-a Virtuala Esperanto-Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) – VEKI-2 komenciĝos jam morgaŭ, sabate, la 7-an de aŭgusto 2021. Ankoraŭ eblas aliĝi.

### 54-A ILEI-KONGRESO VEKI 2

ILEI estas la faka asocio de instruistoj-esperantistoj kaj instruistoj de Esperanto. Ĝi estis fondita en 1949, kiel Ne-Registara Organizo. ILEI estas tradicie ligita kun UEA.

Tiu ĉi evento estas tre grava, ĉar ĝuste instruado de Esperanto estas mejloŝtono, kiu igas Esperanton daŭripova. Dum VEKI-2 vin atendas tre riĉa programo, kiun kunorganizos legendaj aktivuloj de la Esperanto-movado, kiel Mireille Grosjean, Katalin Kováts, Ilna Koutny, Mónika Molnár, Duncan Charters, Stefan MacGill, Adjévi Adjé, Renato Corsetti kaj multaj aliaj. Kadre de la programo okazos la 76-a AMO-seminario. Koncertoj de kelkaj konataj Esperantaj muzikistoj promesas ĝojigi kaj plibuntigi la etoson.



La ĉefa temo de la kongreso estos “Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”.

Ni kore invitas ĉiujn partopreni. Pliajn detalajn informojn trovu ĉe:

<https://ilei.esperantujo.io/veki2021>

## EVENTA SERVO

### Eventa Servo

estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.

*Diskonigu esperantajn eventojn tutmonde*







# La Afrika Komisiono de UEA kunvenis

## Partoprenis AK-anoj kaj konsilantoj de la AK

La 01.08.2021 okazis la kunveno de la Afrika Komisiono de UEA. Laŭ la tagordo de la Kunveno okazis:

1. Raporto pri la agado de la AK
2. Planoj kadre de la agado en Afriko
3. Ĝeneralajoj

Post la bonvenigo de la partoprenantoj fare de la kunordiganto de la Afrika Komisiono, d-ro Elysée, sekvis:

La unua punkto: Raporto pri la agado de la AK, en la afrikaj landoj. Elysée, kiu reĝisoris la tutan programon, profitis la okazon klarigi ion: la Afrika Komisiono komunikas oftege per fejsbuko, ĉar ĝi estas senpaga, ne kiel aliaj monpostulaj komunikiloj. Li informis ankaŭ ke la Konga movado perdis ĉi-jare siajn membrojn: Batangu Mpesa, la prez. de DKEA, s-ron Guy Faustin Lowa, la sekretarion, kaj antaŭ nelonge s-inon Ruth Mbombo el Kinŝaso, kiu forpasis dum la naskado (ŝi partoprenis en la 73-a IJK en Aneho, Togolando, 2017). Kondolencojn al la familianoj de ĉiuj ni, nepre sciu, ke ni kunsentas (Red.).

Adjévi preparas kongreson en Senegalokadre de la Afrika Komisiono de UEA kaj la Sudafrika asocio planos gastigi tutafrican kongreson post tiu en Senegalokadre. Li sciigis ke la *Biblioteko Espero* de Kongo ricevis librodonaĵojn el Italio. Li parolis ankaŭ pri Esperanto-instruado en diversaj lokoj en la regiono de la oriento de DR Kongo: en Goma, en Kiliba.

Pri la mondonaco por komputiloj. La monokolekta kampanjo rezultis de la fakto ke la plejparto de la komisionanoj ne havas komputilojn, aŭ havas nebone funkciajn komputilojn. Tio igas ke kelkaj AK-anoj ne sukcesas partopreni retajn kunvenojn aŭ pli efike retumi, do tio fariĝis prioritato. En la *konto Afriko* estas nun mono por komputiloj por almenaŭ 5 AK-anoj. S-ino Miora envenis la babilejon kaj jen estis ŝia vico paroli: ŝi diris ke ŝi instruas Esperanton en Moramanga kun Fafa, en Antananarivo ankaŭ s-ino Lala instruas Esperanton. Ŝia parolado ne estis klara, eble pro malbona retkonekto.

*Projektoj de Elysée:* D-ro Elysée planas starigi E-klubojn en Maputo, Mozambiko kaj aliaj lokoj.

Joel diris, ke li instruas Esperanton kaj instigas siajn klubanojn ke ili varbu por Esperanto, ĉar la prospero de Esperanto dependas ne nur de unusola homo sed

de ni ĉiuj. Dum la Tago de Esperanto li faris intervjuojn por vespera novaĵelsendo de du lokaj radiostacioj en la vilaĝo Shanje (Ŝanĝe), Suda Kivuo, kie li kreis klubon. En Rutshuru ankaŭ Honoré Sebuĥoro instruas Esperanton en la instituto Njili.

Viktor povis skribi mesaĝon ke en Kamerunio ili instruas Esperanton en la lernejo.

Mirejo Grosjean demandis: ĉu estas decidite ke la 8-a AKE okazu en Senegalokadre? Oni respondis: jes. Ŝi komentis ke la AK trafe elektis Senegalokadre.

*Laŭ la raporto de Joel Muhire*



## "La Ega Kesteto"

"La Ega Kesteto" (1995) estas polica filmo seplingva, kiu rakontas la vivon en svisa garaĝo, kiam trafikritaj problemoj alvenas kaj la laborantoj ne povas kompreni sin. De la filmkompanio Nandir, kun tekstoj de Claude Piron, ĝi estis dualoke premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1995 kaj, okaze de la 2-a Virtuala Kongreso de #Esperanto, donacita al UEAviva de Esperanto Lausanne (Laŭzana Esperanto-Societo), al kiu ni multe dankas. Originale ĝi aperis kiel vidbendo VHS, sistemo PAL. UEA invitas ĉiujn ĝui!

<https://youtu.be/mr916lpTJeo>



<https://www.facebook.com/esperantorevuo>



**Sekvu la revuon Esperanto kaj la Retan Revuon**  
[https://twitter.com/revuo\\_esperanto](https://twitter.com/revuo_esperanto)





# Al la batalantoj

## ■ Tone

Sub la sonbato de l' koro venu kune kun mi  
Danki ĉiujn batalantojn kun forta energi'  
kiuj portas tiun ĉi verkon, tiun ĉi faron  
malgraŭ krizo, malfacilo, venkas ili ĉian baron

Estas bravaj, kuraĝaj, fidelaj, estas lojalaj  
Ĉar permesas la iradon de l' lingvo universala  
Zamenhof – Esperanto  
Nedisigebla unuo. Nedisigebla kanto

Estis li kiu iniciatis tiun revon pro neceso  
Kareseme li ĝin traktis kun devo kaj apreco  
Kaj oferis al la mondo ion de li tre amata  
La junecon, l' animon, ĉion kio estis ŝata

“Fajron sentas mi interne, Vivi ankaŭ mi deziras,  
Io pelas min eterne, se mi al gajuloj iras”  
La 5-an de decembro 1878  
Oni kantis do la himnon, estis la komenca epok’

“Malamikeco de l' nacioj falu, falu jam temp’ estas!  
Kaj la tuta kolegaro en harmonio verve festas  
Estis la unuaj paŝoj de l' senfina marŝado  
Kaj la lingvo do survojas, ne plu halto, ne plu staro

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,  
La verdan standardon – ni ne lasos ĝin fali  
Ĉiam novaj trezoroj tuj aperas por aldono  
Por defendo de la lingvo, por alporti ĝin al trono

Malfacilas nia tasko, malglata estas la vojo  
Sed sentime, senhalte iras ni kun granda ĝojo  
Kun sindono, kun dediĉo, nekompata sinofero  
Esperanto disvastiĝas ĉiuflanke sur la tero

Prozo, verso aŭ romano, lernolibro, dramo, eseo,  
Kaj novelo, artikolo, rakonto, kaj epopeo  
Por ajna ĝenro la lingvo estis ĉiam preparita  
Ĝia utilo por la mondo estas bona kaj profita

Al ĉiuj batalantoj, pro bono kaj favor’  
Ni dankas poreterne, el profundo de la kor’!  
Dankon mi donas ankaŭ al la Pioniroj  
Al la komencantoj, niaj noblaj kavaliroj

Kiuj rolis, laboris en la unua periodo  
Ni vin dankas pro la peno, la strebo kaj klopodo

De la dua, la tria, la aŭtoroj de l' nuntempo  
Viaj verkoj dolĉodoras kiel floroj en printempo.

Ni vin dankas, batalantoj sur la tuta tera globo  
Pro la iniciativoj, la proponoj, kaj aprobo  
Al Vi kiu esperantistas aŭ vi kiu esperantanas  
Al Vi kiu estas ene aŭ de ekstere akompanas

Vi kiu ŝatas, apogas, vi kiu lernas, instruas  
Kiu recenzas milde, akre, iel ajn vi kontribuas  
Vi kiu legas, prelegas aŭ kiu diras nur “saluton”  
Kiu elverŝas tro da varmo aŭ tutesimple unu guton

Vi kiu montras la doloron per larmo kaj per ĝemeto  
Vi kiu manifestacias, vi kiu agas en sekreto  
Vi kiu iras al kongreso, renkonto aŭ festivalo  
Por turismo, babilo, por kulturo aŭ por la balo

Vi kiu verkas, teatras, aktoradas, komponas  
Vi kiu kantas, deklamas, organizas, ĉiĉeronas,  
kiu reklamas, anoncas, heroldas, komunikas  
Proklamas, deklaras, kelkfoje eĉ predikas

Kiu parolas denaske, facile, maltaske  
Vi kiu aplaŭdas, vi kiu flatas, vi kiu laŭdas  
Vi kiu timas la eraron, ankaŭ timas la perfidon  
Ĉar vi volas de l' esperanto propravole naski idon

Kiu stimulas la reformon urĝe, tuje komplete  
Semantike, gramatike, morfologie, alfabeto  
Al ĉiuj batalantoj, pro bono kaj favor’  
Ni dankas poreterne, el profundo de la kor’

